


# PONTO ☆

*Jaro 2 N-ro 6 (13) Organo de Sunda Esperanto Agado novembro 2003*

SEA-renkontiĝo en Malmö la 15.11
Ne forgesu anonci vin al karin@agado.net

## Grava kurso

### Kiel informi al la amasmedioj?

Bengt Nordlöf, ĵurnalisto el Stockholm, gvidos kurson kiel trakti la amasmediojn.
Ĝi okazos 29.11 inter 11.00 – 17.00 h. en la ejo de la klubo en Malmö, Kronetorpsgatan 94.

La kotizo, 60 kr, inkluzivas manĝaĵon.
Bonvenon al interesa kaj utila kurso en la sveda lingvo! Ni atendas partoprenon el la tuta SEA-regiono same kiel el la tuta lando.
Aliĝu al Karin Lindquist plej laste 26.11.

### Someraj kursoj en Lesjöfors 2004

Lennart Svensson invitas al somera kurso la 27/6-4/7 kaj semajnaj kursoj dum la tuta somero 2004. Li anoncis en la broŝuro "Inlandsbanan" pri restado en Lesjöfors dum semajnfino por partopreni E-kurson.


Pro tio Lennart proponas starigi 2-3 personajn grupojn por merkatado de kursoj, kursplanado, ideogrupoj por eblecoj evolui Esperantogården ktp.
Tiuj, kiuj havas okazon helpi lin aŭ havas ideon pri projektoj povas kontakti lin tel. 0590-309 09 aŭ e-poŝto: egarden@esperanto.se



## Nia kara Olle Olsson

En 24-an de oktobro en Lund okazis la funebra solenaĵo por Olle, kiun ĉeestis liaj familianoj kaj aro da lia verda rondo. La oficianta pastro parolis pri la vivo de Olle kaj substrekis kiel gravaj estis por li la Vorto, la Komunikado, la Kompreniĝo inter homoj el diversaj landoj.
La vivo de Olle turniĝis ĉirkaŭ Kompreniĝo kaj Paco, kaj pro tio estas elektita la UN-tago por la lasta adiaŭo.
Dum posta memoriga kunestado, preskaŭ apud la domo en kiu Olle vivis dum jardekoj, familianoj kaj geamikoj rakontis rememorojn pri Olle kaj kiel li influis iliajn vivojn.

Olle Olsson kaj Esperanto por lundanoj estis unu nocio. En nia klubo li ne ofte maltrafis kunvenon. Kaj li kaptis ĉiun okazon por informi pri la valoroj de nia interpopola lingvo. Ĝis 1999 Olle instruis la lingvon – certe centoj da homoj lernis de li Esperanton.
Frank Strahl iam proponis doni al Olle la titolon *Sinjoro Esperanto* kaj nia tanzania amiko Ambrose Polle nomis lin nia *ORA Esperantisto*.
Kun profunda dankemo ni klubanoj memoros nian brilan verdan gvidstelon.
Kara Olle ripozu en paco!
La Esperanta Klubo de Lund
*Anna-Maria Lange*



Nästa **Ponto**, nr 7
utkommer ca 12 dec.
Skicka allt material till
*Karin Lindquist*
senast den 28 nov.

*Sunda Esperanto Agado*
Reto de la Esperanta kunlaboro en la Sunda regiono

Redaktionskommitté/*redakta komitato:*
**Kontaktperson:** *Karin Lindquist* *karin@agado.net*
Sergels väg 14A, SE-217 57 Malmö +46 40 98 01 20

Övriga/kromaj anoj: Sten Svenonius (paĝaranĝo), Helen Claesson (desegnaĵoj), Johan Svenonius (tekniko), Per-Olov Johansson (presado), Gertrud Lund.



ISSN 0907-127X

# La Folio

Klubo Esperantista de Malmö

*Jaro 73 N-ro 6 (682)* ›› Ĉiam antaŭen‹‹

Fondita en 1906


**Memoroj de UK en Göteborg 24.9**

Nia klubo estis bone reprezentita dum la UK pasintsomere, kaj Asta, Kjell, Gertrud, Gerd, Elsy kaj Albert, rakontis pri siaj spertoj tie. Alf kontribuis per videofilmo kaj Ulla per fotoj. Temis pri atenditaj kaj neatenditaj renkontoj, eltrovo de novaj kaj malnovaj geamikoj, interesaj prelegoj, ekskursoj, distraĵoj ktp.

Gertrud Lund

**Kion vi faris pasintsomere 8.10**

La nordia somero estas plena de okazintaĵoj. Dum la vespero ni eksciiĝis pri ĉio inter renkonto kun nizo en Hälsingland kaj okuloperacio en Ängelholm. La parolemuloj estis Asta, Gertrud, Gulli, Per-Olov, Wivi kaj Åke.

Gertrud Lund

**Aŭtuna festo en Malmö 18.10**

Kvar personoj el Helsingborg partoprenis la tradician aŭtunan feston de Klubo Esperantista de Malmö. Ni ĉiuj volas laŭdi la festkomitaton pro la bele aranĝitaj tabloj kun ruĝaj sorboj kaj multkoloraj folioj. Belege!

Kiel kutime ni bone manĝis, trinkis, kafumis – kaj babilis, bedaŭrinde plejparte en la sveda. Mi tute ne volas ofendi iun, sed laŭ mia opinio ni devus dum niaj renkontiĝoj vere klopodi uzi nian lingvon por ne perdi ĝin. Krome, se novaj esperantistoj partoprenus, ili devus havi la ŝancon aŭskulti interparoladojn en Esperanto.

Agneta Lund rakontis pri sia vojaĝo al Istanbul. Ŝi bone preparis la prelegon kaj donis resumon de la historio kaj de la urbo kaj de la tuta lando Turkio. Poste ŝi per lumbildoj invitis nin al ekz moskeoj, banejo (hamam), bazaro kaj ŝipveturo en la Bosporo. Dankon, Agneta, ni multe lernas kaj profitas de via vojaĝemo!

Ann-Louise Åkerlund



**Olle Olsson en mia memoro**

Mia unua renkonto kun Olle Olsson okazis dum la UEA-kongreso en Oslo 1953. Ĉar mi tiam lernis Esperanton nur dum duona jaro li helpis min ofte preterpasi lingvajn malfacilaĵojn. Kaj ek de tiam ni estis tre bonaj amikoj. Li havis ĉiam multajn ideojn kaj realigis ilin ankaŭ.
En la tielnomata ”Dagsverken” li instruis studentojn pri Esperanto kun ege bonaj rezultoj.
Kelkaj partoprenintoj ankoraŭ estas esperantistoj.
Mi ofte kune kun Olle vizitis la programojn en Klubo Esperantista de Malmö.
Dum la lastaj jaroj kiam li loĝis en Linebäck mi vizitis lin. Lastfoje estis post la kongreso en Gotenburgo kaj mi rakontis pri ĝi. Li estis tre scivolema pri kio okazis tie kaj aŭskultis tre atente.



Lastatempe li estis tre laca kaj nun li povas ripozi post longdaŭra laboro.
Karin Lindquist.

## Medlemsavgifter år 2004

Du kan välja mellan två kategorier av medlemskap
(A), som innebär medlemskap i både Malmö Esperantoförening (MEF) och Svenska Esperantoförbundet (SEF) och
(B), som innebär medlemskap enbart i Malmö

(A) **Medlem i MEF/SEF**

| | |
|---|---|
| **Medlem** (från 21 år) | **260 kr** |
| **Ungdom** (t.o.m. 20 år) | **140 kr** |
| **Familj** | **370 kr** |

Du erhåller La Espero och Ponto

(B) **Medlem i MEF**

| | |
|---|---|
| **Medlem** (från 21 år) | **150 kr** |
| **Ungdom** (t.o.m 20 år) | **60 kr** |
| **Familj** | **200 kr** |

Du erhåller Ponto

**Prenumeration på Ponto 70 kr.**
(för icke medlem boende utanför SEA-regionen och tillhörande annan esperantoförening)

**Hyresbidrag** till vår förening mottages tacksamt

Betala vid något möte i föreningen eller per **postgiro 3 87 14-2, Malmö Esperantoförening**
(Avgiften skall ej sändas till SEF:s konto i Stockholm)


Malmö Esperantoförening
*Kronetorpsg 94, SE - 212 27 MALMÖ*
☏ 040-18 71 90
Poŝtĝiro: 3 87 14 - 2

Prezidanto:
*Sten Svenonius* *sten@agado.net*
☏ 040-19 14 77

# Kontaktilo



Membrogazeto de K.E.K
Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago

N-ro 6 (652) novembro 2003 67-a jaro

Kopenhago

## Kara leganto

Bedaŭrinde ne sukcesis al Sunda Agado varbi gelernantojn por la gastinstruistoTerezija Kapista. La aktiveco ĉi tie en Selando jam estis sufiĉe ampleksa.

Meze de oktobro la aranĝo ”Konversacia Kurso” okazis sub gvido de Lars Forsman. Lars Kromann projektis ĝin. DEA subtenis. Ana kaj Erik Hansen varme gastigis la partoprenantojn.

Ĉe Ole Blaust, en nova kursejo en Ny Kongensgade 18, estis oferto pri tag- kaj vesperkursoj dum septembro.
La kutima DEA-semajnfina kurso okazis.

Finfine dum la klubvesperoj ni, KEK/DEFA okazigis kaj porkomencant- kaj daŭrigantkursojn. Paralele studgrupo unue tradukos H.C.Andersen, poste studos laŭ la libro de Kolker ”Vojaĝo en Esperantolando”. La grupo funkcias ĉiun duan lundon (alterne kun programoj). Lene kaj Bent aktivigas nin.
En la retbabilejo, kiun gardas Henning Olsen, oni estas bonvena sin okupi. Diversajn revuojn oni ankaŭ povas studi tie.

**Ni partoprenu en la SEA-kunveno la 15-an de novembro je 10a h. en Kronetorpsgatan 94, Malmö.**

## Kluba raporto

**15. kaj 22.09** Ni spektis vidbendigitajn televidelsendojn faritaj en 1994 kunlabore kun *Ĝernes TV*. Ni revidis Jan Sosniecki, kiu faris serion da bonpreparitaj prelegoj en DEFA. Astrid kaj bulgarino sin prezentis. Jens rolis kiel ĵurnalisto.

**29.09** La kursoj kaj studgrupoj komenciĝis. La grupoj estis sufiĉe grandaj.

**06.10** Jens S. Larsen altkvalite prelegis pri ”La ekesto de la homo”. Priparolataj estis la diversaj flankoj de antropologio. Li per lummontrilo prezentis la jarskemon kun miliardoj da jaroj inter la evoluo de bestoj, simioj kaj homoj. Li ankaŭ prezentis skemon komparante simiojn kaj homojn. Pluraj specoj de bestoj mortos post kiam ili naskis siajn idojn. Homoj faras fajron. La plej pensiga teorio asertas, ke lingvo ne nur temas pri la buŝa elparolo aŭ fingra montrado, sed havas pli profundan signifon. Baze ĉiu homo sur la globo havas la saman lingvon, kiu estas rimedo por pensesprimo. La demando nun estas: “Kiun signifon tiu teorio havas por Esperanto”? – Dankon al Jens por altkvalita kaj laborpostula prelego.

Bent kaj Jytte




LA ESTRARO
Prezidanto kaj redaktoro
Jytte Sunekaer
Højlundshusene 16
3500 Værløse
Tel: 44 48 47 26
Jytte.Sunekaer@mail.tele.dk

Kasisto
Arne Casper
Bryggervangen 70, 4. tv
2100 København OE
Tel: 39 20 63 48
Mobilo: 21 40 84 87
Ĝirkonto 202-5558.
arne-casper@email.dk

Vicprezidanto
Bent Wiinberg
Naeldebjerg Allé 30
2670 Greve
Tel: 43 90 42 01
teo@post11.tele.dk

Sekretario
Jens S Larsen
C/o Trillingsgård
Munkebjergvej 77
2770 Kastrup
Tel: 24 47 50 40
jens_s_larsen@yahoo.dk

Ole Blaust
Ny Kongensgade 18, 2. th.
1557 København V
Tel: 33 33 90 30
blaust@mobilixnet.dk

Libroservo de DEA
Arne Casper
libroservo@esperanto.dk

## JULMIKO


estos aranĝata de KEK/DEFA

**lunde 15.12**
**je la 19-a horo**

La menuo: 3 etaj buterpanoj plus fromaĝkuko kaj kafo. Distrado.

Prezo 40 dkr.
Trinkaĵoj je moderaj prezoj

Aliĝo necesa plej malfrue la 9-an decembro ĉe
**Karen, tel. 55 72 73 77**



## Klubo Esperantista de Helsingborgo

**Karaj geamikoj!**

En la antaŭa numero de Ponto mi skribis ke "revenante, mi esperas trovi longan liston de aliĝintoj al nia intensa kurso". Tiel ne okazis. Eĉ neniu telefonis. Restas nur kelkaj, kiuj pli aŭ malpli jam studis Esperanton.
Pro tio ni decidis nuligi la Ĉe-kurson, kiu celis komencantojn. Anstataŭ ni aranĝos vesperan rondon por daŭrigantoj, ĉiun merkredon ekde la 29.10. La horoj estos 18-20, kaj la loko: la Verdandi-domo en Brevduvevägen 4 (Ättekulla). Naŭ personoj aliĝis al tiu studrondo
Nia iniciato ĉi-foje ne sukcesis, tamen ni ne malesperu. Eble iu semo trafis fekundan grundon. Ĉiuj el ni povas "semi", kaptante ĉiun okazon paroli pri Esperanto kaj ĝia ideo. Sed ne troigu! Mi forte rekomendas la libron de Ziko Marcus Sikosek "Esperanto sen mitoj". Laŭ mi ĉiu esperantisto "devus" legi ĝin.

Ĉu vi aŭdis pri la vizio de Kaisa Hansen? Temas pri kunlaboro inter ĉiuj Esperanto-organizoj, ĉiuj studorganizoj (studieförbund), Folkuniversitetet kaj folkbildningsrådet, por aranĝi studrondojn kaj trejni Esperanto-instruistojn.

Mi proponas, ke ni laŭ nia kapablo donu apogon kaj helpon al tiu projekto.
Ĝis revido!

Ann-Louise

## La Esperanto klubo de Lund

**Saluton klubanoj!**

La 18-an de sept. post estrarkunveno, okazis la unua postsomera kluba renkontiĝo. Temo: Someraj travivaĵoj. Sendube, Stig W. havis la plej streĉan kaj timegigan rakonton. La fortoj de la maro. Pri sia unua IJK en Lesjöfors raportis Daniel. Allan invitis al interesa vojaĝo – celo en Norvegio, kaj Kristina parolis pri veturo tra la bela Vermlanda naturo. Ulla pasigis agrablajn tagojn ĉe diversaj lagoj, kune kun nepino Fatou, 4-jara. Iafoje Ulla falis ĉeborde, Fatou ridegis kaj poste komentis: Estis nekredeble amuze kiam avinjo falis.
Sture prezentis kelkajn temojn el la prelegofesto de la kongresa universitato dum la UK en Gotenborgo. Kiun ankaŭ Anna-Maria partoprenis. I.a. ŝi ĉeestis kunvenon pri Afrika Agado, aŭtoran duonhoron kun Spomenka Ŝtimec kaj ĝuis muzikaĵojn. Aparte interesa estis prelego de Ann-Marie Sandelin, Buroo de familia Juro en Gotenburgo, dum fakkunveno de sociallaboristoj. Temis pri loĝado, kunesto kaj decidrajto pri la infano je konflikoj, inter nekunvivantaj gepatroj, laŭ sveda leĝo – temo verŝajne ne pli frue aŭskultebla en esperanto. Sture kaj Anna-Maria renkontis geamikojn en Montendre kaj Tampereo. La 9-an de oktobro la temo estis:Tanzanio – interrilatoj kun unuopuloj kaj la nuna stato de la sunkuirila projekto, kun revizora raporto de Stig W.

Raportis A-M Lange

## Kajsa Hansens vision

Vi arbetar alla mot samma mål — klubbarna vitaliseras och aktiverar även barn och ungdomar.
Detta sker kanske så här:

**ILEI** står för utbildning

**INSTITUTET** ordnar symposier och gästföreläsare

**SEF** stöder med info-material

**LA ESPERO** är den kompletterande tidningen

**ELDONA** och **AL-FAB-ETO** ger ut böcker

**KELI** värnar för sina medlemmar liksom **SLEA**

**ESPERANTO-GÅRDEN** står för internatverksamhet

**KLUBBARNA** har verksamhet för esperantister i alla åldrar

**Bidrag med goda idéer i La Espero för kännedom i esperantorörelsen!**



| | | |
|---|---|---|
| Lunde 10.11 | KEK/DEFA, Kph | Kursoj kaj studgrupoj |
| Merkrede 12.11 | MEF, Malmö | Ordinara kunsido. Tagordo en Ponto n-ro 5 sur paĝo 2. Poste Lingva angulo |
| Ĵaŭde 13.11 | KEKG, Kopenhago | ” ’Zinaan Ek’ - iom da astronomio kaj stelfolkloro pri la konstelacio de ’Skorpio’ ” Prelego de Mogens Rude Andersen |
| Merkrede 12.11 | KEH, Helsingborg | Studgrupoj |
| Ĵaŭde 13.11 | LEK, Lund | Ĉiuj kunportos objekton kaj pri ĝi parolos |
| Lunde 17.11 | DEFA, Kopenhago | Numerludo |
| Merkrede 19.11 | KEH, Helsingborg | Studgrupoj |
| Dimanĉe 23.11 16.00 h. | MEF, Malmö | Aŭkcio – Auktion. Se bifogad inbjudan. Tag med vänner och bekanta. Välkomna |
| Lunde 24.11 | KEK/DEFA Kopenhago | Kursoj kaj studgrupoj |
| Merkrede 26.11 | KEH, Helsingborg | Studgrupoj |
| Lunde 01.12 | KEK/DEFA Kopenhago | Komuna manĝado - mendu buterpanojn ĉe Ruth tel. 36466279 aŭ kunportu mem vian manĝaĵon. Kursoj. Kunportu objekton kaj rakontu pri ĝi. |
| Merkrede 03.12 | KEM, Malmö | Atendante la Kristnaskon ni aŭskultos muzikon kaj kantojn. Al la kafo: luĉifestaj kringoj. |
| Merkrede 03.12 | KEKG, Kopenhago | ”Mia vivo en Belgio i.a. kiel interpretisto en Bruselo”. Prelego de Eliza Kehlet |
| Merkrede 03.12 | KEH, Helsingborg | Studgrupoj |
| Dimanĉe 07.12, 14.00 h. | LEK, Lund | Kristnaska foiro en la IM-Kafejo, Spoleg. 10 C |
| Lunde 08.12 | KEK, Kopenhago | Bent denove ludigos nin |
| Merkrede 10.12 | KEH, Helsingborg | Studgrupoj |
| Sabate 13.12, 19.30 – 23.00 | KEKG, Kopenhago | ”L.L. Zamenhof - festvespero. Programo paĝo 6 |
| Lunde 15.12, 19.00 h. | KEK/DEFA, Kph | JULMIKO. Aliĝo necesas, vidu paĝon 3 |

Informoj pri horoj kaj adresoj ktp. sur paĝo 6!

# Informoj pri esperantokluboj kaj grupoj de SEA

### Klubo Esperantista de Malmö, K.E.M.

La kunvenoj komenciĝas je la 18.30 h
en Kronetorpsgatan 94, 212 27 Malmö
Kontaktpersonoj: sten@agado.net
aŭ karin@agado.net
Karin Lindquist,
Sergels väg 14 A, 217 57 Malmö,
tel. 040-98 01 20

### La Esperanto Klubo de Lund, L.E.K.

Niaj monataj kunvenoj okazos ĉiun duan jaŭdon en monatoj sept.-majo je la 18.30-a h. en la ejo de nia studorganizo SENSUS, Krafts torg 12 A.
Kontaktpersonoj: Anna-Maria Lange,
Bredgatan 27, 222 21 Lund, tel. 046-147309
aŭ rete: Allan Ljungstedt,
allan.ljungstedt@telia.com

### Klubo Esperantista de Helsingborg, K.E.H.

La kunvenoj okazos je la 14-a horo en Faktorsgatan 5.
Bonvolu informiĝi ĉe Ann-Louise Åkerlund tel. 042-291262 aŭ 042-186639 (oficejo) aŭ ĉe Barbro Haraldsson tel. 042-121471

### Konversacia Esperantista Klubo Kopenhago, K.E.K.

kunvenas en la ejo de DEFA, Vasbygade 10, Kopenhago (proksime al Fisketorvet) ĉiujn lundojn inter 19.30-22.00.
Por eniri: uzu la sonorilon ĉe la pordego.
Kontaktulo: Jytte Sunekær, tel. 0045-44 48 47 26
Rete: Jytte.Sunekaer@mail.tele.dk

### Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo, KEKG

Aranĝoj en Medborgerhuset, Danasvej 30 B, atingebla per buslinio 29 el stacio Vesterport, salono n-ro 1, dua etaĝo.
Pordoj malfermitaj 19.00-23.00. Ĉiu prelego okazos ĉ. 19.30 – 20.30.
Se vi deziras detalojn pri la prelegoj aŭ havas demandojn pri la aranĝoj bonvolu turni vin al Torben Svendsen, Vanløse Alle 57,
DK-2720 Vanløse. Tel. 0045-38 74 97 64
rete: tsv@vip.cybercity.dk

### Fervojista klubo en Kopenhago, DEFA

Kunvenejo Vasbygade 10. Kontaktulo: Astrid Birkbak, tel. 44 97 43 29
Ĉiun lundon retbabilejo inter la horoj 19a kaj 22a

## Invito al Zamenhof-vespero

La Kopenhaga Esperanto-Kulturgrupo (KEKG) invitas vin al Zamenhof-vespero, sabaton la 13-an de decembro 2003, (Luĉia Tago) je la horo 19.30 ĝis 23.00 en Frederiksberg Medborgerhus, Danasvej 30 B, salono n-ro 1, dua etaĝo.

**Programo:**

1. **Torben Svendsen:** *Bonvenigo je* 19.30
2. **Mogens Rude Andersen**: *Mia 5064-a esperantista tago – renkontiĝo kun japana kulturo (20 min.)*
3. **Maria Henriksen**: *Deklamado de propraj poemoj (10 min.)*
   Paŭzo - manĝaĵo kaj trinkaĵo (30 min).
4. **Jonas & Mathias Dalmose**: *La fratoj ludas irlandan muzikon (35 min.)*
   Ili ludis kaj prezentis la muzikon dum la UK en Gotenburgo
5. Spontanea parolado aŭ deklamo (10 min.)
6. **Ujutna interbabilado** kaj daŭrigo de la *muziko*
   Fino de la programo 22.40

Hejmpaĝo de SEA:
www.agado.net
Respondeculo Johan Svenonius

Ni esperas, ke vi aliĝos kiel eble plej baldaŭ al inspira kaj ujutna vespero. Ni povos regali vin per: sandviĉoj, teo, kafo, ĉokolado, glaso da vino kaj kukoj je ***prezo de 50 kr.*** po persono.

Bv. aliĝi kiel eble plej baldaŭ **- aŭ plej malfrue la 7-an de decembro 2003 al:**
**Torben Svendsen: Tel. 387 97 64,**
**rete: tsv@vip.cybercity.dk**

La KEKG deziras al vi Ĝojan Kristnaskon kaj Feliĉan Novan Jaron, 2004!
Ĝis la revido *denove merkredon la 14-an de januaro 2004, al nova aranĝo en la Esperanto-kulturgrupo* .

Kore salutas,
Lis Thune, Eugeniusz Rybarczyk kaj Torben Svendsen